DE

705. 199


# Sur Posteno

**Oficiala organo de IPE - Internacia eldono**

Dua jaro N-o 25 | Aperas dufoje en ĉiu monato | Oktobro (II) 1934


Unu el la venontaj n-oj de SP komplete estas dediĉata al la IPE-movado en Britio. La tutan materialon por tiu n-o liveras BLEA( sekcio de IPE). Kiu IPE-sekcio aŭ UK sekvos?

## Ni estas, ni restas

*Kiam la berlina IPE-Centro disiĝis kaj Internaciisto estis malpermesita, tiam multaj el niaj kontraŭuloj ĝoje ekesperis, ke la fino de la IPE-movado estis veninta. Eĉ en krucvortenigmoj oni fantaziis pri la „mortinta IPE"! Mistifikoj, eraroj, mensogoj! IPE ĉiam vivis, vivas, vivos! Nian movadon ja portis freŝaj fortoj, spertaj batalantoj, IPE-anoj! Kaj post tre malgranda tempospaco la IPE-anoj ankaŭ rehaviĝis al si la eblon por publike paroli al la proletesperantistoj: Sur Posteno aperis. Niaj sovetiaj k-doj ebligis ĝian eldonadon.*

*Dum pli ol unu jaro SP kolektis, organizis, gvidis la IPE-anojn kaj proletesperantistojn. Dum tiu tempo SP ankaŭ servis kiel bulteno de SEU. Viva kontakto kun la sovetia esp-movado ekfunkciis kaj ankoraŭ funkciadas. SP akiris al si la simpation de la proletesperantistoj. Ili ne plu volis malhavi sian gazeton, indan posteulon de „Internaciisto". „Kial SP ne aperas regule?" estis demando, ofte aŭdebla dum krizaj monatoj.*

*Hodiaŭ ni povas fari provon por regula eldonado de la gazeto. Volonte la k-doj en la IPE-Oficejo klopodas plenumi la decidon de la IPE-Konferenco pri aperigo de la gazeto en Nederlando. Tamen, ĉies helpo estas bezonata. Ankaŭ nun la nombro de la k-doj kunverkantaj estas pli granda ol tiu de la finance kaj varbe subtenantaj. La unuaj estas tiel necesaj kiel la aliaj. Sed sen financoj ne eblas labori daŭre kaj sukcese.*

*Jam sufiĉas, se vi faras energian varbokampanjon por SP. Konsideru, ke la dufoja apero pomonate faciligas al vi la varbadon. Ne parolu pri la ekonomiaj malfaciloj. Proletaj entreprenoj ĉiam devas lukti kontraŭ ili.*

*Sciu, ke la ĉefan, financan fundamenton por la eldono de SP dufoje pomonate metis proletesperantistoj, kiuj devas labori sub ne priskribeblaj kondiĉoj: kamaradoj el GLEA fidele pagantaj sian asocian kotizon disponigis la necesan sumon. Ni montru nian respekton al tiu akto de nevenkeblo kaj solidaro per abonado kaj varbado. SP devas vivi kaj paroli! IPE-anoj, sur posteno!!*

*Redakcio de SP.*

## La IPE-Konferenco en Lille

### 2-a Internacia IPE-Kongreso okazos en Aŭgusto 1935 en Antverpeno, Belgio

La 1-a Internacia I.P.E.-Konferenco, okazinta 12-15.8.'34. en Lille, Francio pruvis la internan, organizan kaj ideologian forton de I.P.E.

Kelkaj semajnoj sufiĉis, por organizi konferencon kun jena konsisteco:

| Lando: | Delegitoj: | Gastoj: | Sumo: |
|---|---|---|---|
| Belgio | 1 | 1 | 2 |
| Britio | 3 | 7 | 10 |
| Danio | 1 | — | 1 |
| Francio | 6 | 34 | 40 |
| Germanio | 8 | 3 | 11 |
| Nederlando | 1 | 5 | 6 |
| Saarlando | 1 | — | 1 |
| Sovetio | (Reprezentanto) | 1 | 1 |
| Svedio | 1 | — | 1 |
| 9 | 22 | 51 | 73 |

Por la stabilo de la I.P.E.-movado parolis la fakto, ke la malnovaj batalantoj en I.P.E. prezentiĝis kun freŝaj fortoj kaj kun entreprena laboremo. Sed ankaŭ serio da novaj funkciuloj atestis la magnetan efikon de I.P.E. al klaskonsciaj proletesp-istoj.

La I.P.E.-Konferenco povis registri kelkajn novajn venkojn de I.P.E. en la lasta jaro: aliĝis al I.P.E. la Aŭstralazia L.E.A., fondiĝis Unuigaj Komitatoj (U.K.) en Danio kaj Svisio. Reviviĝis la movado en Japanio kaj Ĉinio. Kun granda entuziasmo la konferencanoj salutis la anojn de la G.L.E.A.-delegitaro, kiu konsistis el *8 kamaradoj*, *orde elektitaj* en diversaj G.L.E.A.-kunvenoj.

Kiom ligitaj sin sentis la konferencanoj kun la sovetiaj k-doj, kiam sovetiano salutis la konferencon ne nur en la nomo de la sovetia esperantistaro, sed ankaŭ en la nomo de la tutsovetiaj laboristkamparanaj amasoj!

La internacian karakteron de la konferenco ankaŭ substrekis la amaso da salutleteroj. El Danio, Britio, Germanio Nord-Ameriko, Svedio, Bulgario ktp. I.P.E.-anoj salutis. La Hispaniaj laboristesp-istoj estis sendintaj salutleteron, per kiu ili alvokis al unueciga laboro. El Ŝanhajo, Kobe, Tokio alflugis (kaj ĝis fine de Septembro alflugis!) skriboj kun bondeziroj, proponoj, instigoj. Neniam la sendintoj de la salutskriboj estis individuoj. Ĉiam ili reprezentis iun organizan unuon de I.P.E.

* * *

La transiro de la I.P.E.-Centro el Moskvo al Leningrado trovis konsentan aprobon. Moskvo situas enlande. Leningrado estas la fenestro al la cetera mondo. En Leningrado ja ankaŭ troviĝas nia „I.P.E.-sendstacio".... Nun ĉiu I.P.E.-sekcio, ĉiu U.K., ĉiu I.P.E-ano devas zorgi pri regula kontakto kun la I.P.E.-Centro. Se k-do S. J. Smith en „Ruĝa Esperantisto", la organo de Britia L.E.A. konstatas neniun distingon „inter la estrado kaj la planko, inter estraro kaj la ordinara konferencano", do ni klopodu, ke tiu eco de nia konferenco estas konstate-



La konferencejo k la konferencanoj

bla ankaŭ rilate la kunlaboron de ĉiuj I.P.E.-organizoj kaj individuoj kun la I.P.E.-Centro.

* * *

Laŭ la decido de la konferenco S.P. nun estas presata en Nederlando. Certe tiu decido ŝarĝas la I.P.E.-Oficejon kun pli da zorgoj. Sed tiuj zorgoj neniun klinas. Kontraŭe tiuj zorgoj pli streĉas, pli aktivigas nin. Pri la deveno de la komenca, financa bazo ni jam skribis aliloke. (Vidu la artikolon „Ni estas, ni restas.") La I.P.E.-konferenco donis aron da instigoj kaj proponoj por la plibonigo de S.P., por la tasko fari el S.P. plej multe legatan, proletan esp-gazeton. Por plenumi tiun taskon ne sufiĉas la voko: „S.P., aperu regule!" Ni ĉiuj devas kunhelpi, varbi, aboni kaj abonigi. La konferencanoj decidis, ke S.P. aperu regule. Do ili faru en siaj koncernaj I.P.E.-organizoj la necesan laboron. Nur, se ni konstante gardas pri la sorto de nia gazeto, ni sukcese povos plenumi la admonon de miloj da proletesperantistoj: „S.P. aperu regule!"

* * *

La I.P.E.-anoj ĉiam klopodas apliki esp-on por la klasbatalo. Ili faras tion ĉefe per P.E.K. Ne mirige, ke tial la diskutoj pri la P.E.K.-laboro estis intensivaj, ja ofte pasiaj. Tiuj diskutoj ja ne baziĝis sur teoriaj konsideroj. Ekzistas bazo, larĝa fundamento por la P.E.K.-laboro. Rilate tiun branĉon de nia laboro la britaj delegitoj sendube multe influis la konferencon. Montriĝis, ke la P.E.K.-aparato indentas ofte kun preskaŭ sola, informada servo. Pri tio konvinkas nin komuniko de la ĉinia P.E.K.-Centro, laŭ kiu ĉiniaj k-doj informiĝas pri la fakta situacio en la Saar-regiono nur per la P.E.K.-Bultenoj de la Saar-regiona L.E.A. (I.P.E.-sekcio).

Ĉiuj konferencanoj konsentis pri la neceso (kiun antaŭ ĉio akcentis niaj britiaj k-doj), ke P.E.K. devas funkcii pli bone en la fabrikoj, ĉe neesperantistaj laboristoj. Tiu laboro ne esceptas la aktivadon por pligrandigi nian anaron laŭmombre, tasko, pri kiu siavice emfazis la reprezentantoj de la francia I.P.E.-sekcio. P.E.K. estas la baza ŝtono de la I.P.E.-movado. P.E.K. karakterizas la I.P.E.-movadon. La I.P.E.-konferenco ankoraŭfoje vokis al ĉiuj proletesperantistoj, ke per la P.E.K.-laboro estas eble (kaj nepre!) starigi es-pon en la servon de la proleta klasbatalo.

* * *

Tra la laboristaro iras forta sento pri la neceso de unueciĝo. En kelkaj landoj tiu sento jam kondukis al unuecfrontaj, organizitaj agadoj. La sama sento ankaŭ penetris la diskutojn de la I.P.E.-konferencanoj. Klariĝis, ke la platformo de unueca fronto devas esti klasbatalo, defendo de la Sovet-Unio, batalo kontraŭ milito, faŝismo kaj imperialismo. Ne temas pri abstrakta starigo de la problemoj. Efektive kontraŭkapitalistan laboron la proletesperantistoj faras, partoprenante la ĝeneralan batalon de la laboristaro. Samspecan laboron la proletesperantistoj sur sia speciala kampo faras per praktika apliko de esp-o. La P.E.K.-laboro ebligas tiun agadon. La proletesperantistoj devas unuiĝi por la praktika, interliga, interkoresponda agado laŭ la bazo de P.E.K. Nur la unuecfronta kunbatalo efektive unuecfrontigas ĉiujn proletesperantistojn.

* * *

Jen, ĉiuj laboroj postulas koncentrigitan ofensivon de ĉiuj I.P.E.-organizoj. Pri la ĝusteco kaj aplikendo de la metodoj, elektitaj dum la I.P.E.-konferenco instruos al ni la sperto. Ĉiuj konferencanoj estis konkordaj en la opinio, ke necesas, kiom eble plej baldaŭ kontroli la taskojn plenumitajn kaj plenumotajn, fiksi novajn vojojn, starigi novajn, sukcesigajn planojn. Tial la konferenco decidis, ke en Aŭgusto de la jaro 1935 (do por tiel diri post kelkaj monatoj!) okazu la 2-a Internacia I.P.E.-Kongreso en Antverpeno, (Belgio). En Belgio la I.P.E.-movado ankoraŭ estas juna. Sed niaj k-doj havas fortan entuziasmon. Ili certe sukcesos aranĝi la necesajn aferojn. Ili ja ne estas solaj! Ni ĉiuj helpas laŭpove! Kaj la relative favora situo de la kongresurbo ebligas, ke la 2-a I.P.E.-kongreso fariĝu efika manifestacio por la proleta internaciismo, por la unueca fronto kaj la batalo kontraŭ faŝismo kaj imperialisma milito, por la proleta esp-movado, por I.P.E.!

* * *

Iu sinjoro skribis en la „Nia Gazeto": En laboristaj esperantogazetoj mi ofte legis, ke la t.n. „burĝaj" kongresoj estas kunvenoj por amuziĝo. Oni ne laboras tie. . . . mi ne klare komprenas, kion oni tiurilate volas esprimi per la vorto ‚laboro' „. Al tiu sinjoro nia I.P.E.-konferenco certe instruus, kio estas laboro. En 9 laborkunsidoj dum 3 tagoj, komence de la 9-a h. ĝis la 22-a aŭ 23-a h. kunsidis la konferencanoj. Dum la mallongaj paŭzoj tagmezaj kaj vesperaj ne atendis ilin „abunda bufedo". Ni memoras ankoraŭ pri la germana k-do, kiu en la tagmezo, maĉante sian panon kaj pecon da malbona kolbaso al la demando, ĉu li ne volas kuniri por manĝi respondis: „Jen, sufiĉas. Mi ne kutimas alion". Tiu laboremo kaj ideologia forto, kiujn ne estingas eĉ malsato, mizero kaj persekuto estas la apogo de I.P.E. Neniu alia esp-organizo inspiras al la proletesperantistoj tiun laboremon, tiun ideologian forton. Pri tio konvinkas nin la simplaj soldatoj, batalantaj en Ĉinio, Bulgario, Germanio, Japanio ktp sub I.P.E.-flagoj.

La I.P.E.-Konferenco pasis. Al la laboro laŭ la konferencdecidoj. Vivu la 2-a, Internacia I.P.E.-Kongreso en Antverpeno!

## Konferencimpresoj

(El Ruĝa Esperantisto, organo de Blea)

Tri aferoj impresis min ĉe la konferenco. Unue, min impresis la praktika laboremo k serioza atento al la taskoj. Forestis la „ventaj" paroladoj.

Due, mi forte sentis la demokratecon de la konferenco. Ne estis tiu distingo inter la „estrado" k la „planko", inter la estraro k la ordinara konferencano, kiu regas ekzemple ĉe la neŭtrala kongreso.

Trie impresis min la granda delegitaro el Germanio k ties priskriboj de la laboroj faritaj sub la plej malfacilaj kondiĉoj.

S. J. Smith.

Unu fakto, kiu mirigis min, estis la rapida paso de la tempo. Ĉiam, kiam paŭzo estis anoncata, mi estis surprizata pri la tempo. Ĉiu momento de la konferenctempo estis interesa, ne estis sekaj, malviglaj paroladoj, kiel oni povas sperti dum multaj konferencoj. Ni kunsidis ĉiutage, ĝis post la 22-a h. kaj nur interrompis la kunsidojn por manĝado. . .

H. J. Clayton.

La konferenco donis al mi definitivan opinion pri la diro: „tipa germano", „tipa franco" ktp. Dum la unua konferenctago mi klopodis eltrovi la diversajn naciojn k mi estis frapita: erare oni unue rigardis min kiel hollandanon kaj alifoje kiel belgon. En unu afero ni ĉiuj estis tipaj: ni ĉiuj estis k-doj, kiuj siaflanke kunlaboris en la lukto por la tutmonda socialismo. G. Simpson.

Unu el la impresoj, kiujn oni tre forte sentis, estis la nombro de gejunuloj partoprenantaj la konferencon. Almenaŭ tri kvaronoj el la ĉeestantoj estis k-doj havantaj malpli ol 30 jarojn. Kompreneble tio certigas la estontan vivon k influon de nia movado. Ankaŭ ilia entuziasmo k vigleco tre multe impresis min. Ni *ne* bezonas voli sukceson al nia movado, ĉar mia tuta impreso post la konferenco estas, ke la junaj, entuziasmaj k kompetentaj gvidantoj certigas al ĝi fortan, utilan k inspiran kreskadon. Longe vivu IPE!

W. Lowe.

# Gvidrezolucio, unuanime akceptita de Konferenco

La Konferenco de I.P.E. en Lille konstatas, ke la sukcesa laboro kaj kresko de I.P.E., unuiganta en siaj vicoj proletajn Esperanto-organizojn el ĉirkaŭ 30 landoj spite al la faŝismo kaj ĉiuspecaj malfaciloj, kiuj rezultas el la kapitalisma krizo, montras, ke ĝia linio estas ĝusta kaj ĝia bazo firma.

La ĉefa manko estas nebone funkcianta centro pro diversaj kaŭzoj. La Konferenco de I.P.E. bonvenas Leningradan IPE-Centron kun la espero, ke ĝi regule funkcios kaj gvidos la laboron laŭ la praktikaj bezonoj de la sekcioj.

IPE-Konferenco konstatas la neceson por revolucia sin- kaj interkritikado pri farita laboro, por la disvolvo kaj kapabligo de la sekcioj por siaj taskoj.

*Ĉefaj taskoj de la sekcioj.*

La ĉefaj taskoj de la sekcioj estas praktikaj taskoj: plibonigo de peresperanta laboro en klasbatalo, direktita precipe al la fabrikoj kun ideologia edukado kaj organizado konformaj al la rolo de la klasbatala Esperanto-movado en la nuna periodo de batalo kontraŭ faŝismo kaj milito.

Ni vokas la sekciojn de I.P.E. por sin pretigi ideologie kaj organize por labori sub mallegalaj kondiĉoj, se necesos.

Ni vokas la fortajn sekciojn patroni la malfortajn sekciojn kaj UK-ojn sisteme laŭ difinita plano.

IPE-Centro kaj ĉiuj sekcioj helpu al siaj koloniaj kamaradoj, kolektu iliajn adresojn por fondi novajn sekciojn kaj PEK-filiojn. La adresojn de koloniaj k-doj en Oriento liveru al ĉina IPE-sekcio, por ke ĝi kontaktu kun ili por nia komuna celo. Zorgu pri proletesperanta movado en Oriento.

*Pri „Sur Posteno".*

Konsiderante la malakuratan aperon de „Sur Posteno" en Moskvo pro la tieaj kondiĉoj kaj la nesufiĉa proksimeco de sovetia redakcio al la cirkonstancoj en la kapitalistaj landoj, la malfacilan stilon kaj tro partiecan enhavon, la netaŭgan materialon, kiu malebligas la eniron en mallegalajn landojn

IPE-Konferenco proponas:

1. ke la redaktado kaj presado okazu en unu loko ekster Sovetio, kiel loko: Amsterdam;
2. ke la gazeto aperu akurate ĉiudusemajne, sub la sama titolo, presita sur maldika papero, kvarpaĝa, samformata se eblas.

La gazeto estu organizilo, edukilo (ne tro partia). Ĝi ne devas konkurenci kun la nacilingvaj gazetoj, sed enhavi organizajn direktivojn por PEK-laboro kaj rubrikon „Tra IPE-Kolonoj". Ĝi evitu insultojn kontraŭ alitendencaj organizoj, kaj evitu la uzon de neologismoj aŭ almenaŭ nepre klarigu ilin. La stilo estu facile komprenebla kaj proleta, la frazoj mallongaj.

*Tasko de la Sekcioj.*

IPE-Konferenco alvokas la sekciojn kaj UK'ojn kontaktiĝi kun IPE-centro en Leningrado. Ĝi ankaŭ aprobas la pluigon de IPE-oficejo en Amsterdamo, kiu zorgu pri administrado kaj redaktado de „Sur Posteno" kaj plua funkciado de Ekrelo en Nederlando.

*Unueca Fronto.*

Danke ricevinte saluton de P.U.I.L. (Proleta Unuiĝo de Iberamerikaj Laboristaj Esperantistoj) kaj ties proponon pri unuigo de la tuta Esperanto-movado proleta, la Konferenco proklamas, ke la reunuigo de la tuta proleta Esperanto-movado estas urĝe necesa, ĉar ĝi respondas al sento de la tutmonda laboristaro volanta decide batali kaj renversi kapitalismon.

Ĉar la ĉefa rolo de Esperanto en nuna epoko estas servi praktike por la interligo de la tutmonda proletaro, IPE-konferenco deklaras, ke unueca agado povas kaj devas okazi unue per partopreno de ĉiuj esperantistaj laboristoj en la kolektiva korespondado por kunligi la diverslandajn laboristamasojn el la fabrikoj kaj laborejoj.

Ni vokas ĉiujn k-dojn el I.P.E., S.A.T., I.S.E. kaj aliajn sendependajn organizaĵojn partopreni la PEK-laboron, kiu estas la plej bona bazo de kunlaboro.

Ĉiuj esperantistaj laboristoj diverstendencaj konsideras unuecon, kiel la plej bonan rimedon por plifortigi nian movadon kaj nian rolon en la batalo kontraŭ kapitalismo, milito, faŝismo, imperialismo.

IPE-Konferenco deklaras, ke I.P.E., kiu estas la plej forta internacia proletesperantista organizaĵo, estas preta partopreni kaj eĉ iniciati la fondon de ununura organizaĵo de tutmondaj esperantistaj laboristoj.

Unueco estas necesa por batali kaj venki. Tial unueco de tutmonda laborista esperantistaro devas baziĝi sur la samaj principoj de la nun ekunuiĝanta tutmonda proletaro:

severa klasbatalo;
internaciisma strukturo;
batalo kontraŭ faŝismo, milito, imperialismo.

Kompreneblaj kondiĉoj de kamaradeca unuigo estas respekto al ĉiuj tendencoj kaj ankaŭ al leĝo de laborista demokratio.

*Kongreso.*

IPE-Konferenco decidas, ke la dua internacia kongreso de I.P.E. okazu en Antverpeno. Ĝi alvokas la tutmondan esperantistan laboristaron propagandi por tiu kongreso kaj amase partopreni ĝin.

Vivu la unueca tutmonda Internacio de Proletaj Esperantistoj!

---

## Pluaj rezolucioj de la IPE-konferenco

*Helpo de Germania L.E.A.*

(Dum la kongreso de S.A.T. en Valencio iu S.A.T.-ano diris i.a. „. . . . ĝi (IPE) vivas fakte nur en Sovetio". Eble tiu ĉi rezolucio instruas iomete pri la fakta stato).

La I.P.E.-konferenco en Lille aplaŭdas la aktivadon de la k-doj en GLEA. Ĝi akceptas la proponon, laŭ kiu GLEA ne nur finance, sed ankaŭ organize pretas helpi al la I.P.E.-movado, disponigante al la I.P.E.-Oficejo organizan helpanton.

La I.P.E.-konferenco promesas helpi tiun aktivecon per laboro interliga k subtena.

*Por la liberigo de Telman.* La I.P.E.-konferenco protestas kontraŭ la okazonta proceso kontraŭ Telman antaŭ la t.n. „popola tribunalo".

I.P.E.-konferenco postulas almenaŭ, ke la proceso kontraŭ Telman okazu antaŭ orda tribunalo, kun publika juĝado k allaso de ĵurnalistaro. I.P.E.-konferenco postulas eblon de defendado per eksterlandaj advokatoj k plie la forigon de la leĝoj kun reefikanta juĝoforto.

---

**La plej gravaj decidoj de la IPE-Konferenco en Lille**

1 IPE-Centro estas en Leningrad
2 IPE-Oficejo en Amsterdam plu funkcias kiel ĝis nun.
3 PEK-Centro estas en Sebastopolo
4 Sur Posteno estas eldonata dufoje monate en Amsterdam
5 La 2-a Internacia IPE-Kongreso okazos en Aŭgusto 1935 en Antverpeno

# Laboristaj esperantistoj raportas

## Dumpromena organizado

*Aŭstrio.* La stato de la esp-movado estas la sama, kia antaŭe. La malmultaj, neŭtralaj grupoj, kiuj estas fonditaj post la okazoj de Februaro sub la komisario k kiujn permesis la gvidantoj de la „popolaltlernejo" estas likviditaj. La likvidon entreprenis parte la polico, parte la membraro, ĉar la laboristaj esp-istoj ne volas aliĝi al la patria fronto.

Tiel ankaŭ okazis en nia distrikto. En Aŭgusto ni iutage faris promenadon k dum ĝi ni plu laboris por nia movado. Ni tuj fondis grupetojn de 3-5 gek-doj. Tiuj grupetoj kunvenas unu fojon po semajno.

## Karakterizaj informoj

*(El letero de SP-abonanto)*

*Jugoslavio.* Mi loĝas en landparto nomata Hercegovino. Kion mi tie ĉi povis rimarki, mi raportas.

Jugoslavio estas lando agrokultura. La plejmulto el la loĝantaro estas etkamparanoj, etkomercistoj k etmetiistoj. Ili ofte laboras per tre primitivaj iloj.

La vivon de la vilaĝanoj karakterizas jena ekzemplo: unu ĉevalŝarĝo da ligno kostas 4 dinarojn. Por haki ĝin en la arbaro, transporti k vendi ĝin la vilaĝano bezonas unu tagon k duonan. Por 4 dinaroj oni povas aĉeti nur du kilogramojn da tritika pano. Jen, kia mizerega, sed fakta perlaboro!

Popoldeputito de la reĝa registara partio (ĉiuj aliaj partioj estas malpermesitaj) por gajni la voĉojn de balotontaj vilaĝanoj aranĝis, ke la komunumo mendis maizon por malsataj vilaĝanoj. Oni vendis la maizon je prezo iom pli malalta ol la komercistoj. Nun antaŭ la komunumaj magazenoj estas videblaj grupoj de vilaĝanoj dum la tuta tago. Ili atendas siajn vicojn por aĉeti maizon, ĉar tritiko estas neatingebla lukso por ili.

Tabako k vino estas ĉefaj artikloj de la Hercegovinanoj. La tabakkulturistoj rajtas vendi tabakon nur al la ŝtato je prezo, kiun la ŝtato difinas. La gazetoj raportas, ke la ŝtato aĉetas tabakon de la tabakkulturistoj k pagis 6 dinarojn po kilogramo. Produktinte el la tabako cigaredojn, la ŝtato vendas ĝin por 500 ĝis 2000 dinarojn po kilogramo.

La ĝenerala krizo malebligas debiti vinon tiel enlande, kiel eksterlande. La vendita vino enspezigas nur sensignifan sumon. Tiel same statas kun ĉiuj aliaj vilaĝaj produktoj.

Estas konstanta riproĉo de la vilaĝanoj: „kion ni vendas, ni devas vendi tro malkare. Por tio, kion ni aĉetas, ni devas pagi monerojn pli pezajn ol la varo." Kaŭze de tio la vilaĝanoj enŝuldiĝas ĉe diversaj procentegistoj k bankoj.

Laboristajn, politikajn organizojn oni jam malpermesis en la jaro 1924. De tiu jaro de tempo al tempo rimarkiĝas eksterleĝa agado laŭ verdiktoj de ĉefa, ŝtata juĝejo en Beograd: kutime longejara mallibero, foje ekzekuto.

Ekzistas permesitaj sindikatoj de la 2-a Internacio. Sed pro malĝusta k nesincera agado de la gvidantoj k pro la sensignife eta membraro ilia funkciado ne estas rimarkebla.

Sed tamen, pri la silenta k konscia orientiĝo de la laboristoj atestas la antaŭ nelonge okazinta entombigo de la ladisto Gojko Vuković, konata kiel ĉiam senkompromisa k konsekvenca laborista gvidanto el Mostar. Li laboranta sur konstruo malfeliĉe falis k mortis. Eĉ la naciismaj gazetoj miris pri la granda nombro da akompanantoj al la tombejo. . . . Preskaŭ la tuta laboristaro de Mostar tiel esprimis sian simpation al sia idea gvidanto.

---

DEKLARO.

*(el la Mondo, Ŝanhajo, Ĉinio)*

Deklarante min ĉina korespondanto de „Sur Posteno", mi vokas jenajn kolegojn, ke ili faru la samon: Changwaling, Ĉenmindo, C. Ŝaŭ, Ebner, Fubin, Huiucz, Jelezo, Saint-juleszee, Seight, Takin, Tikos, Zensto. Ĉ. Ĉen.

---

# Kiel mi trovis la veron per esperanto por socialismo

En la jaro 1929 mi abonis el Usono latvan, laboristan gazeton „Laborista Mateno". En ĝi mi foje trovis artikolon pri la vivo de la laboristaj ep-istoj kaj pri iliaj kongresoj. Tiun artikolon ensendis iu S.A.T.-ano, ĉar malsupre estis malnova adreso de Novjorka S.A.T.-grupo.

Mi tuj mendis el Novjorko esp-lernlibron. Kompreneble oni sendis al mi angla-esperantan kaj Petro-lernlibrojn. Sed ne sciante la anglan lingvon bone mi pripensis — se estus latva esp-eldono, mi tuj mendus ĝin. Mi havis iun latvan librokatalogon. En ĝi mi ankaŭ trovis anoncon pri esp-lernolibro por latvoj. Poste mi mendis la plej novan eldonon. Tiel mi seninterrompe studis la lingvon.

Dum tiu tempo mi abonis la gazeton „Ondo de Daŭgava". En ĝi mi legis anoncon pri latva-esperanta vortaro pretigota. Mi tuj mendis ĝin kaj ricevis ĝin post unu jaro. Sed tiu ĉi latva-esperanta vortaro kun ĉirkaŭ 10.000 vortoj nur estis bona, kiam mi legis latve por traduki en esp-on. Sed por mi mankis tamen esp-latva vortaro. Tial mi baldaŭ decidis transskribi ĝin. Mi finskribis ĝin dum 4 monatoj k lernis samtempe multajn vortojn. Akurate kiam mi estis transskribinta la tutan vortaron mi subite legis en la sama, jam citita gazeto, ke aperos presita esp-latva vortaro. Kompreneble mi tuj mendis ĝin.

Poste mi aliĝis al U.E.A. Oni sendis al mi „Esperanto"n, membrokarton k jarlibron. En la jarlibro mi trovis adreson de U.E.A.-delegito. En la sama jarlibro ankaŭ estis anoncita U.E.A.-grupo sed tie la maljunulino, kiu mem forgesis esp-on deklaris al mi, ke la grupo jam de 8 jaroj ne plu ekzistas. Ĉe la delegito mi konatiĝis kun alia esp-kamarado.

Tiam mi aliĝis al S.A.T. Ankaŭ mia amiko diris, ke S.A.T. estas favora, laborista organizo. Tamen, kiam mi ricevis la unuan n-on de la S.A.T.-gazeto mi trovis artikolon, laŭ kiu la sovetiaj k-doj prirabis la S.A.T.-organizon ktp. Tial mi pensis, ke mi devas serĉi certan klarigon kaj mi decidis aboni „Bultenon" el Moskvo, (konforman adreson mi trovis en la U.E.A.-jarlibro).

Kiam mi ricevis „Bulteno"n, mi komprenis, en kia malnobla stato troviĝas S.A.T.! Tiam mi forlasis S.A.T. kaj U.E.A. tute. Ankaŭ mi malabonis al „Ondo de Daŭgava". Nun mi jam la duan jaron estas abonanto de Sur Posteno, de aliaj prolet-ĵurnaloj k ankaŭ de sovetia literaturo. Tiel mi finfine trovis la veron. Kiu serĉas, tiu trovas.

„La „neŭtraluloj" diras, ke devo de ĉiu esp-isto estas disvastigi esp-on inter la popolo. Sed kian „neŭtralecon" ili uzas? Ili ja perfidas la Zamenhofajn ideojn! El tio estas konkludeble, ke tiuj t.n. „neŭtraluloj" agas serioze kiel burĝa klasapogilo k nenio plu!

En nia urbo mi aranĝis kelkajn esp-kursojn. Sed ĉiam la kursanoj disiĝis. Laŭ mia scio nur du laŭ mia iniciativo lernas esp-on: estas mia filo (blinda) k mia bofilo. Mi mem havas 61 jarojn.

Mi multe korespondas k propagandas por la proleta esp-kunligo tutmonda. Nur tiel ni povas helpi venki la faŝismon k militon tra la tuta mondo.

Johano Grausdin (Kanado).

# MANOVROJ kontraŭ UNUECO

Skuata de profunda daŭra krizo, kapitalismo penas eviti nepran pereon, starigante faŝismon kaj militon kontraŭ ribelanta proletaro. Sed la proletaro, trompita dum la lasta milito, dissplitiĝinta poste, venkita en Germanio, ekkonscias pri siaj eraroj. Enpensiĝinte, la proletaro konkludis, ke la du plej potencaj armiloj por ĝia liberigo estas *klasbatalo* kaj *unueco*.

Jam en Francio, Hispanio, Italio, Saarlando, Aŭstrio.... la unuecfronto de socialistoj kaj komunistoj estas starigita kontraŭ faŝismo. Unueco urĝe necesas por batali kaj venki. Sed kia unueco? Ĉu unueco kun neŭtralismo kaj kunlaborismo? — Ne. Unueco revolucia kontraŭ kapitalismo!

Sur esperantista kampo, tiun unuecon efektivigis IPE, entirante en sin la plejmulton el ĉiutendencaj proletesperantistoj. Sub influo de l'unuecfronto starigita en kelkaj landoj, multaj kamaradoj el SAT, ISE kaj naciaj organizaĵoj (hispana PUIL....) vokas al unueco.

Ni ĝojas pri tiu antaŭsigno de kamaradoj restintaj ekster IPE, en SAT kaj ISE. Tiuj unuecemaj voĉoj, kiuj aŭdiĝis en Valencia, estas la plej forta kondamno al la kontraŭkomunisma taktiko de SAT kaj al apartiĝo de ISE. „Unuecon ni volas!" krias nun la membroj de SAT kaj ISE.

Sed antaŭ tri jaroj, la gvidantoj de SAT — malrespektante leĝon demokratian de la plimulto — forpelis per ukazo la tutan revolucian opozicion (marto 1932), t.e. 3200 membroj, kiuj laŭtigis sian proteston en la opozicia referendumo. Nur 877 voĉoj en la SAT-direkcia referendumo favoris la direkcion. La malunuecemo de la SAT-gvidantoj kaŭzis la katastrofan falon de SAT: 7400 membroj en 1930 — nur 1400 en 1933!

La saman eksigan manion ekhavis ISE. En lasta marto, ISE-direkcio eksigis la hungaran sekcion HESL (preskaŭ 1000 membrojn), la plej revolucie aktivan. Kaj nun ISE organize preskaŭ ne plu ekzistas. La gvidantoj, kiuj eksigis alitendencajn kamaradojn, ne rajtas paroli pri unueco en proletesperantista movado.

Al la malsupraj kamaradoj, kiuj esprimis sian unuecemon en Valencia, ni dankis kaj respondis per nia aparta rezolucio en Lille-a konferenco. Nun ni konas la rezolucion de Valencia pri unueco, kaj ni nin turnas al la samaj kamaradoj por montri al ili, kiel la SAT-gvidantoj aliigis ilian unuec-proponon en manovron kontraŭ unueco.

La rezolucio de la SAT-kongreso estas emfaze adresata al la soveta registaro kaj al ĉiuj laboristaj esperantistoj en la mondo — sed ne al IPE — por plendi, ke SEU ŝuldas 75.000 frankojn frankojn al SAT (!) kaj misinformis la sovetiajn instancojn, kiuj malpermesis eniron de Sennaciulo kaj SAT-libroj en Sovetion.

La rezolucio konkludas, ke „la bazo por reunuiĝo estas la plenumo de du kondiĉoj: a. ....likvido iom-post-ioma de la malnova ŝuldo (?) b. nuligo de la malpermeso al SAT-libroj kaj -gazetoj(!)"

Al tiuj, kiuj bone konas la historion de la konflikto en SAT, tiu rezolucio aspektas malvera, blufa, ruza kaj impertinenta. La celo de la SAT-gvidantoj estis kredigi, ke SEU ŝtelis kaj misinformis, kaj per tiu malveraĵo ili kondiĉas bazon de unueco!

La 75.000 frankoj, aluditaj apartenas nek al SEU, nek al SAT, sed al IPE — ĉar en IPE-on venis la plejmulto el la SAT-anoj. Tiu plejmulto eĉ laŭtigis sian posedrajton al la tuta havaĵo de SAT uzurpe konservata de la malfidita direkcio. La SAT-gvidantoj ploras pro mono, kiun ili ne sukcesis uzurpi, kaj ili samtempe provas kalumnii sovetajn esperantistojn. Sincere unuecemaj kamaradoj sin demandos, kiel pago de mono povas esti kondiĉo por unueco — ĉar se plena unueco dezirata efektiviĝos, la demando pri mono ne plu staros. IPE firme deklaras, ke la tuta havaĵo de IPE apartenos al unueco de proletesperantistoj, kaj ke ne unu cendo falos en SAT-kason. SAT provas ekspluati unuecon por havi monon, dum sian tutan monon SAT devus doni al unueco.

Sennaciulo kaj SAT-libroj ne estas enlasataj en Sovetion. Sur Sennaciulo sisteme aperas atakoj kontraŭ komunismo, kontraŭ kvinjarplano (konsiderata, kiel piramidlaboro de faraonaj sklavoj). Oni komparas Stalin al Musolini. Sur SAT-libroj oni asertas, ke Georgio estas subpremata lando; la frazoj de Lenin estas falsitaj. La lasta eldonaĵo de SAT estas „Filozofio de la homa digno" kaj celas batali kontraŭ marksismo. Unueco postulas principojn kaj kondiĉojn, kiujn menciis IPE-konferenco en sia rezolucio, sed kiujn ignoras la SAT-gvidantoj. Unu kondiĉo estas respekto al ĉiuj proletaj tendencoj. Unueco ĉiam defendos Sovetion. Unueca organo ĉiam estos enlasata en Sovetion.

Kiu ne ridas, legante en la Valencia rezolucio, ke SAT „kalkulas en siaj vicoj ankoraŭ hodiaŭ la plej grandan parton de proletaj esperantistoj en la landoj, kie ĝi havas ekzisto-rajton (!)". Estas proksimume 25.000 organizitaj proletesperantistoj, el kiuj 14.000 apartenas al IPE. En 1933, SAT havis nur 1400 aktivajn membrojn. Blufo, por kredigi, ke SAT estas la centra kaj ĉefa organizaĵo. La socialistaj esperantistoj, antaŭ ol fondi ISE, riproĉis, ke SAT neniam sukcesis arigi la plimulton de la laboristaj esperantistoj.

Kia ruza trompo kaŝiĝas en jena parto de la SAT-rezolucio: deziras „multaj kamaradoj, eĉ en Sovetio mem (!), vidi restarigitaj la amikecajn rilatojn (de SAT) kun le sovetlandaj esperantistoj, kiuj nuntempe estas izolitaj de siaj tutmondaj fratoj (!)". La „2.000 membroj kaj abonantoj en Sovetio", pri kiuj aludas la rezolucio voĉdonis kontraŭ la SAT-direkcio kaj estas nun en IPE. Neniu subtenas SAT en Sovetio. Neniun nomon oni povis publikigi en jarlibroj de SAT, sed la gvidantoj argumentas, ke mencii nomojn estus denunci SAT-anojn al kompartio, kiu sendus ilin en malliberejon!! Tian spiritostaton havas la SAT-gvidantoj: ili malamegas bolŝevikojn — tamen ili sin turnas al la bolŝevika ŝtato en plenda rezolucio por kondiĉa unueco!

M. Boubou.
Daŭrigota.

# Klara respondo

„La Mondo", sendependa organo de la esp-movado en Ĉinio anoncis pri la IPE-konferenco, publikigante ĉine la (bedaŭrinde por ni ne legeblan) tagordon. En samaj n-oj (6-7) troviĝas artikolo „Sennaciulo aŭ imperialist-agento?", en Kiu Ĉ. Ĉen rebatas cinikajn mokojn de la SAT-organo Sennaciulo pri la kontraŭimperialisma, liberiga movado en Ĉinio. Ni prezentas al niaj legantoj parton de la artikolo:

„Laŭ Lanti: 'Cetere, la popoloj, kiuj ne kapablas tiri profiton el la naturaj riĉoj, troviĝantaj en „siaj" landoj, ne rajtas laŭ natura leĝo malhelpi aliajn utiligi tiujn riĉaĵojn' (La laborista esp-ismo, pĝ. 28). Bone, ĉinaj militistoj estas bonaj sekvantoj de la lantia koncepto. Ili lasis al la japanaj imperialistoj tute senĝene okupi la vastan Manĉurion kun senvaloraj, naturaj riĉaĵoj. Sed ĉu la japanaj imperialistoj, utiligante la riĉaĵojn de la Manĉurio pli bonigis la vivon de la manĉuria loĝantaro aŭ tiun de ĝiaj enlandaj laboruloj? Aŭ ĉu ĝi donos ian helpon al la „historia procezo" per la riĉaĵoj manĉuriaj? Ne, milfoje ne! La profitoj tiritaj el la manĉuriaj riĉaĵoj nur pli grasigis la japanajn bienul-burĝojn. La naturajn riĉaĵojn en Manĉurio ili utiligas por prepari militon kontraŭ Sovetio, por plua buĉado al ĉinaj amasoj, unuvorte, por detrui pli multe da homaj riĉaĵoj! . . . La moko de Sen-ulo al „La Mondo" esprimas refoje, ke S.A.T. fariĝis organizaĵo ne plu por nia fincelo sennaciigi la homaron, sed por imperialismo, por hombuĉado, por eternigi la nunan klasan k nacian sociordon."

# Pek-Fronto

## Nia opinio

(Respondo al la artikolo de k-do Keable „Al ĝusta linio", aperinta en S.P. n-o 6. Tiun ĉi artikolon la ĉiniaj k-doj direktis al la P.E.K.-kunsido de la I.P.E.-konferenco en Lille.)

La opinio de k-do Keable estas ĝenerale ĝusta. Li prave substrekas la gravon de la kolektiva korespondo celanta „revoluciemigi la nerevoluciajn amasojn", elmontrante la grandajn mankojn sur la nuntempa PEK-fronto. Sed laŭ ni tio ne povas esti kaŭzo por subigi la presservan laboron je la „duegrava". Samgrade gravas por ni la lasta.

En lando kia Britio estus tre facile por revolucia gazetaro varbi korespondantojn el ĉiuj landoj pro disvastiĝo de la nacia lingvo k pro pli favoraj cirkonstancoj. Sed ni tre dubas, ĉu en Hindio, Koreio, Islando, Norvegio, Bulgario, Hungario, Nederlando ktp ktp oni „ricevas internaciajn informojn sen esp-o k ĝenerale pli rapide". En Ĉinio nun ni ankoraŭ ne legis sen esp-o pri la nuna vivo de laboristoj en Hitlerio. Oni avide serĉas tian artikolon en esp-gazetoj k ĉiulandaj bultenoj. Ĵurnaloj ja enpresis multajn Reuter-ajn k Havas-ajn telegramojn pri Saar-problemo. Tamen, por koni la veran staton ni nur bezonas foliumi la Saar-PEK-bultenon aŭ La Ponto'n (ambaŭ tre bone redaktataj). Tia stato estas supozeble ankaŭ en aliaj kolonioj.

Cetere ni ĉinaj IPE-anoj prenas sur nin specialan, gravan taskon por raporti al tutmondo en nia bulteno pri la vero pri Sovet-Ĉinio, pri kiu la tutmondo malmulte informiĝas. Tion pruvas multaj leteroj de sovetiaj k-doj, kiuj ricevis nian bultenon. Tian taskon ni povas plenumi nur per bulteno, ĉar korespondo inter Sovet-Ĉinio kun kiu ajn alia loko estas blokata de Kuomintan.

La enhavo de ĉiulandaj bultenoj ankoraŭ ne estas kontentiga. Kelkaj laŭ ni estas tro bagatelaj. En iu urbo strikas 2000 laboristoj. Nu, tiu informo estas nek interesa, nek utila. Evitu ĝeneralaĵojn k 'skribu konkrete k interese pri etaj okazaĵoj anstataŭ prezenti grandajn eventojn*). En tio kuŝas la karakterizo de nia PEK-servo. Saman opinion havas ankaŭ k-do Keable.

*) evento: okaz- (int- ant- ont-) aĵo).

## 2a Internacia IPE-Kongreso Antverpeno

*1-a komuniko.*

La grupo „Solidareco" informas, ke la Kongresa Komitato (K.K.) por la 2-a I.P.E.-Kongreso estas fondita. Adreso de la K.K. estas: L. De Graeve, Zilversmidstr. 31, Antverpeno, Belgio.

La kongreso okazos 10-15. 8. 1935. Aliĝkotizo: *f* 1.—. La KK preparas la eldonon de bonformata kongresafiŝo. Ĝi kostos proksimume *f* 0.40. Kelkaj ekzempleroj de ĝi estos sendataj al la diversaj organizoj.

Organizu la partoprenon al la 2-a IPE-Kongreso!

## IPE-Oficejo atentigas...

*Adreso de la IPE-Centro estas: Homo, Poŝtkesto 305, Leningrad 1, USSR. Ĉiu IPE-organizo tuj devas interrilati kun la IPE-C k komuniki al ĝi taŭgan adreson. Sendu al la IPE-C ĉiujn viajn eldonojn (landa IPE-organo, PEK ktp.) Pri ĉiuj organizaj demandoj informas la IPE-C. Landoj neatingeblaj de la IPE-C direktu sin al la IPE-O.*

*Membrokartoj eldonendaj laŭ konferencdecido estas pretaj. Prezo f 0.05. La membrokartoj ĝenerale estas destinitaj por tiuj IPE-anoj, kiuj loĝas en landoj sen IPE-sekcio. Tiuj lastaj ja eldonis ĝis nun proprajn membrokartojn. Ĉar principe la individua aliĝo al IPE ne estas ebla (escepte en landoj, kie nek estas IPE-sekcio, nek UK) la membrokartoj estas aranĝitaj tiel, ke la koncerna IPE-organizo (UK) per stampo povas signi, ke ĝi estas la organizo, al kiu apartenas la aliĝinto. Krome la kartoj estas uzeblaj por la grupoj. La IPE-kotizmarkoj estas pretaj post iom da tempo.*

*Finkalkulado (pago de IPE-kotizoj) estu praktikata en ĉiu tria monato de la jaro; komence de decembro 1934. Speciala regularo estos sendata al ĉiu IPE-organizo. Tiu aranĝo ne nur ebligas pli bonan superrigardon al la IPE-O, sed ankaŭ al la IPE-organizoj.*

*Raportoj. Kelkaj IPE-organizoj ne regule sendas raportojn pri agado, aliaj sendas nacilingvajn. La raportoj estu liverataj monate en esp-o k sendataj po unu al la IPE-C k IPE-O. Ĝenerale la raportoj estu la bazo por la artikoloj sub la rubriko: „Tra IPE-Kolonoj".*

*SP. Por franca k brita SP-abonantoj la gazetoj ne plu estas sendataj al la abonantoj rekte, sed al la koncernlandaj SP-agentejoj. Tiuj ĉi instancoj distribuas la gazetojn al la unuopaj abonantoj. Por la aliaj landoj ni devas aranĝi same. Faru tiurilate la necesan antaŭlaboron k komuniku al la IPE-O centran adreson. IPE-O estontece sendos SP-on rekte nur al abonantoj, kiuj ne estas anoj de IPE.*

# Promenetoj tra la verda kampo

*Inter si*

Finfine la „arjoj" estas inter si. Ĉiuj „nearjaj" anoj estas eksigendaj el la germana esp-movado (oficiale-faŝista). En la tria regno oni kutime kondamnas la kreaĵojn de judoj (muzikon, literaturon ktp). Laŭ tiu linio oni do devus kondamni ankaŭ esp-on, kreaĵon de judo. Sed tion oni dume ne ŝatas, ĉar esp-o estas uzata en la lasta tempo multe por komercaj celoj k por la burĝa turismo. Por trovi „gracon" ĉe la regantaj sinjoroj oni do simple „nur" elĵetas la „nearjojn", do en la praktiko la judojn. Ni tute ne intencas defendi la t.n. „homaranismon", senkonsidere, ĉu tiun ismon subtenas „arjoj" aŭ alirasanoj. Sed objektive: kio okazus al Zamenhof, se li vivus k hazarde estus ano de la germana esp-movadeto?

*Dum UEA-kongreso (El „Nia Gazeto")*

„Ĉu ne povas emocii la fina, komuna kantado de „La Espero", de nia himno, kiu vokas al io pli bela, al io pli bona, al io pli homa? Ĉu ne revekiĝas konsciencriproĉoj en tiuj, kiuj nur kelkajn tagojn antaŭe eligis el sia esp-anaro malnovajn membrojn, nur pro tio, ke ili apartenas al alia „raso"? Ĉu ili povas trankvile, sen ruĝiĝa honto stariĝi kanti komune tiun kanton de l'amo, tiun preĝon de l'espero? Ĉu ili ne pensis en tiu momento al la esperantistoj.... kiuj ĉion donis el si por sukcesigi ilian landan movadon k kiujn ili nun elpelas, pro tio, ke ili estas — laŭdire — alirasaj aŭ pli ĝuste de alia religio? Ĉu ili kuraĝis kanti himnon de Zamenhof? Mi observis k mi vidis, ke eĉ la oficiala delegito de la unua arja esp-asocio leviĝis...."

*La nekonata esp-isto*

Dum la 16-a U.E.A.-kongreso en Stokholmo oni emfaze kaj grandbuŝe oratoris pri la „nekonata esp-isto". Ĉu oni ankaŭ memoris pri la miloj da diverstendencaj proletesp-istoj (kiuj aperas en neniu statistiko), kiuj en la faŝistaj landoj batalas persiste, sub persekuto k danĝero? Ĉu oni memoris pri tiuj esp-istoj el la germana neŭtrala movado, kiuj kaŝe aliĝas al la laboristaj grupoj, ĉar „ili ne plu povas elteni" en la ŝima reakcia atmosfero de la germanfaŝista esp-movado? Ĉiuj ĉi esp-istaj unuecfrontanoj komprenas pli k pli, ke por forigi la faŝisman subpremon necesas renversi la kapitalismon. K tial la elegantaj sinjorinoj k sinjoroj en Stokholm (k en multaj redaktejoj!) boneduke forgesis ilin.

O. Flok.

*Adreso de IPE-Oficejo, EKRELO, Sur Posteno: Postbox Z 5, Amsterdam-Z., Nederland*

## Neŭtralismo k faŝismo

Interesaj okazintaĵoj respegulas en Germanio la veran vizaĝon de t.n. neŭtrala esp-movado. „Heroldo de Esp-o" en la n-o 38 denove publikigas ciferojn de „Honora Listo" de subtenantoj. Ĝi laŭdas tiujn amikojn, kiuj donacis al ĝi monon por vivigi Heroldon, kiu ekzistas 15 jarojn. Sed la gazeto tamen ne kuraĝas diri la kaŭzon de la bankroto.

La redaktoro de Heroldo tre bone scias, ke li antaŭ la faŝismiĝo povis laborigi en la presejo 8-9 laboristojn. Nun eble nur 3 laboras. Laŭ propra konfeso el eksterlando oni ne mendas librojn k ne gazetojn. La kaŭzo estas tute klare la faŝismiĝo de tiu ĉi organo.

UEA, GEA k Heroldo en Germanio tute faŝistiĝis, sed la proceso, kiu daŭris ĝis mezo de tiu ĉi jaro nun donis precizan pruvon. GEA malaperis, fondiĝis NGEA (Nova Germana Esp-Asocio). La nova estraro eldonis la unuan n-on de „Esp-o en Germanio". En ĝi ni povas legi, ke inter Heroldo k NGEA estas fakte la unueca fronto. En la statutoj ni vidas, ke ĉiu aktiva membro de NGEA, ankaŭ ricevas senpage Heroldon.

Laŭ la statutoj oni rajtas propagandi nur por Hitlerio. Membroj nur povas esti „arjoj" purrasaj. Judoj, pacifistoj ktp ne plu havas rajton en Germanio.

Proleto.

## Atentu, atentu, tie ĉi parolas IPE!!

*Stacio Leningrad, RW 53*
*Ondlongo 1224,5.*

K-doj en eŭropaj landoj, aŭskultu la regulajn radioinformojn de la I.P.E.-Centro. La dissendado okazas ĉiam merkrede k sabate. Tempo de la dissendado: 22.35-a horo ĝis 23.05 horo. Ĉiudimanĉe: 17-a horo ĝis 17.30-a horo.

Ĉiuj sendohoroj estas indikitaj laŭ mezeŭropa tempo (M.E.T.). Speciale estas disaŭdigataj problemoj de la proleta esp-movado k informoj el la I.P.E.-vicoj.

Disvastigu tiun ĉi informon inter la esp-istoj. Publikigu koncernajn notojn en viaj sekciaj- k U.K.-bultenoj.

Adreso por informpetoj ktp.: Radio-Komitato (I.P.E.), Proletkulta 2, Leningrad 11, U.S.S.R.

# Korespondadu!

Tarifo por korespondado: trilinia anonco kostas 2 respondkuponojn. Ĉiu plia linio kostas 1 respondkuponon.

DANIO.

K-do Erik Heegaard, Gl. Kongevej 132, Kopenhago V, dez. koresp. kun kemiistoj ĉl.

FRANCIO.

Mi dez. koresp. kun gek-doj el Rusio pri politikaj temoj. Adreso: Jean Daumal, Villa les Vins, Avenue de la Concorde, Arnouville les Goenesse (Seine et Oise).

ITALIO.

Malsanulflegantoj, kiuj deziras korespondi kun samprofesianoj el Italio k laboristoj de sovetia kemiindustrio, kiuj deziras korespondi kun samindustriaj laboristoj el Italio skribu al F. Visser, Postbox Z 5, Amsterdam, Nederlando.

NEDERLANDO.

K-do A. Pinster (masonisto), Oostvoornschestr. 15-b, Rotterdam, dez. koresp. kun sovetiaj samprofesianoj, speciale kun masonistinoj.

ATENTU

en n-o 26 de S.P. aperas i.a. la PEK-rezolucio akceptita de la IPE-konferenco

SOVETIO.

Nia siberia meza lernejo (9 lernfakoj, 12 geinstruistoj, 320 gelernantoj) deziras interrilati kun nederlandaj lernejoj. Adreso: A. Zanadvorov, P.O. Tjamencevo, Zapad. Siberio.

SVEDIO.

K-do B. Sundkvist, Karlbergsvägen 25,I Stockholm, deziras koresp. amatore pri geologio, zoologio, botaniko, arkeologio k hejmregiona esplorado.

## Alvoko

La 10-an de Novembro 1934 la Novjorka grupo de LEA-NA aranĝos grandskalan festenon kun partopreno de grandnombra laboristaro neesperantista k delegitoj de aliaj lab.-organizoj.

Ankaŭ teatraĵo en esp-o estas prezentata. Ni petas vin ĉiujn, esp-grupojn, individuojn en la tuta mondo, sendu al nia festeno salutleterojn. Ni klopodos rekompenci.

Adreso: LEA-NA, P.O. Box 101, Station K., New York City (U.S.A.)

## LA MONDO

Abonu al sendependa, monata, ilustrita organo de Ĉina Esperanto-movado, kun progresema tendenco kaj interesa enhavo, leginda por ĉiuj prolet-esperantistoj.

Jarabonkotizo 5 respondkuponoj (aŭ 6 fr. fr.), abono per egalvalora nova libro ankaŭ akceptebla.

Provnumeron petu ĉe ĉiuj IPE-sekcioj.

Adreso: P.O. Box 274, Shanghai, Ĉinio.

# Novaj EKRELO-libroj

Stalin, *J. Raporto ĉe la 17-a Kongreso de K.P.S.U.* (no 65 *) Prezo: *f* 0.30.

La libro estas pli ol seka raporto. La parolado de Stalin kontaktigas nin kun amasoj da detaloj pri socialisma konstruado, pri rilatoj de S.U. al kapitalistaj landoj ktp ktp. La sprita maniero, per kiu St. spicas kritikajn rimarkigojn ofte elvokis aplaŭdan konsenton de la kongresanoj, kiuj *aŭskultis* la paroladon, samkiel okazos certe ĉe la leganto, kiu *legas* ĝin.

Radek, *K. Arkitekto de Socialisma Socio* (66) Prezo: *f* 0.20.

La batalo de Stalin, arkitekto de socialismo, estas priskribita en tiu ĉi libro. Kun aparta ĉapitro: I. V. Stalin (mallonga aŭtobiografio).

*Pri la 2-a Kvinjarplano de Evoluo de popolekonomio en U.S.S.R.* (1933-1937) (67) Prezo: *f* 0.10.

Isbaĥ, A. *Kun Pafilo kaj Libro* (68) Prezo: *f* 1.25.

*Ekrelo* eldonis serion da libroj, kiuj priskribas diversforme la diferencon inter kapitalisma k socialisma labormanieroj. Jen, libro 68 detale konatigas al ni la socikonstruan, klerigan laboron de la ruĝa armeo, kiu estas preta defendi la Sovet-Union. Absorbite ni travivas „labortagojn de ruĝarmeano".

Mendu ĉe: Postbox Z 5, Amsterdam, Nederland.

*) De nun ni aldonas al ĉiu libro n-on. Se mendanto ne ŝatas citi la plenan titolon de la libroj, do sufiĉas indiko de la koncerna n-o.